

Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo

Christer Kiselman



1. Enkonduko

Paul Neergaard (1907-02-19—1987-11-13) estis agronomo kaj esperantologo. Lia plena nomo estis Pierre Paul Ferdinand Mourier de Neergaard. El liaj kvar antaŭnomoj Mourier estis la familia nomo de iu praavo, Pierre Paul Ferdinand Mourier (1746–1836). En siaj verkoj li ne uzis la nobelan nomon *de Neergaard*, nur *Neergaard*.

Li estis fondinto de la scienco sempatologio kaj fondis la Danan registaran instituton pri sempatologio por evolulandoj, kies direktoro li estis 1966–1982. Lia ĉi-rilate plej grava faka verko estas la duvoluma libro *Seed Pathology* ‘Sempatologio’ (1.1.1977), ampleksanta 1187 paĝojn.

Neergaard estis kunfondinto de la esperantologio kiel scienca fako kaj skizis la taskojn de tiu branĉo de la lingvistiko en vojmontra artikolo “La esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj” (2.2.1942d).

Li fondis kaj redaktis de 1949 ĝis 1961 la revuon *Esperantologio*. Entute aperis de ĝi 6 kajeroj.

Mi provos skizi la vivaktivecon de Paul Neergaard, precipe liajn kontribuojn al la esperantologio.

2. Frua vivo

La patrino de Paul Neergaard estis Karen Andrea Schiønning (1873–1960), la patro Aage de Neergaard (1862–1937). Ili havis kvin infanojn: Ebbe (1901–1957); Vilhelmine Margrethe (1902–1997), edziniĝinta kaj vivinta en Nov-Jorko; Paul (1907–1987); Jørgen (1910–1937); kaj Erik (1911–2002), librovendisto.

La plej aĝa filo Ebbe estis film- kaj teatrohistoriisto, fakte la unua en Danlando kiu komprenis kinon kiel arton. Li luktis por la pionira filmreĝisoro Carl Theodor Dreyer (1889–1968), kiu inspiris i.a. Ingmar Bergman (1918–2007). Ebbe ankaŭ verkis librojn kaj artikolojn pri verkistoj, i.a. pri Kaj Munk, Mogens Klitgaard, Kjell Abel kaj Evelyn Waugh.



Vilhelmine, Paul kaj Ebbe.



Paul maldekstre. Ebbe, centre, estas la plej aĝa; Erik, la plej juna. Dekstre Vilhelmine kaj Jørgen. Foto verŝajne el 1915.



Pentraĵo fare de Kai Gøtzsche (1886–1963) de la familio de Neergaard en 1917. Vilhelmine, Jørgen, patrino Karen Andrea, Erik, Paul staranta kaj Ebbe sidanta plej dekstre. Mankas la patro Aage.

Jørgen Neergaard, pli juna frato de Paul, tradukis libron de Sigmund Freud, *Tre afhandlingar om seksualteori* ‘Tri disertaĵoj pri seksteorio’, 118 pp., kiu aperis en 1935.

Paul edziĝis kun Kamma Bodil (1908–1967; denaska nomo Trautner). Ili havis kvar infanojn: Jørgen (n. 1938), kuracisto; Jesper (n. 1939), skulptisto kaj verkisto; Karen Birgitte (1942–2011), baletdancistino; kaj Marianne Benedikte (n. 1946), dominterna arkitekto.

Jesper, la dua filo de Paul, estas fama skulptisto. Li faris i.a. la skulptaĵojn *Espero* en Graz kaj *Futuro* en Zagrebo — ambaŭ estas dediĉitaj al esperanto. Ekzistis planoj fari grandegan skulptaĵon kun la nomo *Konkordo* en Bjalistoko okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof en 2009 – la Universala Esperanto-Asocio ja organizis sian Universalan Kongreson tie en tiu ĉi jaro. La planoj ne realiĝis. Antaŭstudo en formo de modelo tamen estis realigita, kaj ĝi nun troviĝas en la Jerusalema Teatro en Jerusalemo. Li faris buston de sia patro en 1977. Tre



Busto de Paul Neergaard farita de Jesper Neergaard en 1977.

rimarkinda estas lia kvar metrojn alta kaj ok tunojn peza skulptaĵo *Die Heie* ‘La Montodorso’, kiu staras ekde 1985 je la alto de 1400 metroj en Chlosteralp en la svislandaj alpoj, proksime al Neu St. Johann en Appenzell (*Heie* ‘montofirsto, mallarĝa montodorso’). Ĝi simboligas la konekton inter la tero kaj la kosmo. Ĝia historio estas rakontita en svisa dokumenta filmo nomita *Das Geheimnis der Heie* ‘La sekreto de La Montodorso’.

3. Lukto kontraŭ rasismo

En la jaro 1937 Paul Neergaard eldonis libreton kun la titolo *Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso*. Jam en la antaŭparolo li skribas:

En la Tria regno la reakciaj rasteorioj trovis la plej malkaŝitan kaj klaran formon, sed karakterizaĵojn de rasismo oni facile trovas en ĉia burĝa ideologio. (1.1.1937:3)

Per tiuj vortoj la motivo de la broŝuro estas klara. Sekvas ĉapitro kun la titolo “La fundamentaj reguloj de la heredado” (pp. 5–17) kaj alia “La Heredado ĉe la homo” (pp. 18–30), kiuj prezentas normalan popularsciencan priskribon de la genetiko kaj klarigon kiel organismoj heredas siajn trajtojn. Tamen rimarkinda estas lia eldiro

Estas bedaŭrinda fakto, ke en la nuna privatkapitalisma socio, organizita laŭ la patreca familisistemo, la natura evoluo de la homo kun ĝia biologie bazita emo sekvi la ĝeneralajn leĝojn de la naturo, kiel ĉiuj aliaj kreaĵoj sur la tero, estas ĉiamaniere malhelpata. (1.1.1937:27)

La posta ĉapitro estas pli polemika: “Rasoscienco kaj rasismo” (pp. 31–55). Li tie citas la “novan judpersekutan leĝon de la 15a de septembro 1935, la t.n. «leĝo por la protektado de la germana sango kaj la germana honoro».” (pp. 39–40).

“La socia funkcio de la rasismo” estas “defendi la nunan kapitalisman sistemon de anarkia produktado kaj vardistributado kontraŭ la socialisma sistemo de science bazita produktado kaj vardistributado” (p. 49).

Iom naiva kun niaj nuntempaj konoj aperas lia aserto “Nek ekzistas plu en Sovetio iu juda problemo — ĝi jam estas solvita.” (p. 52).

Fine li forte pledas por “konscia, seksjesa politiko,” kiu postulas “[...] plenan memkompreneblan rajton por la seksmatura junularo pri reciproka seksvivo” kaj “plenan politikan, ekonomian, seksan kaj sociajn egaligon de la virino kun la viro ktp., ktp.” Li finas per

En la batalo kontraŭ rasa mistikismo, tiu pozitiva, naturscience bazita sekspolitiko, — celante la iom-post-ioman formiĝon de nova, pli sana seksmoralo, — gravege helpas kontraŭmini tiun ismon, kiu enkondukis novan mezepokon. (1.1.1937:55)

En tiu ĉi sinteno al seksaj kaj politikaj aferoj Paul ne estis sola en la familio. Lia pli juna frato Jørgen tradukis verkojn de Sigmund Freud (1856–1939), estis apoganto de Wilhelm Reich (1897–1957) kaj mem verkis kontraŭ la naziismo. La plej aĝa frato Ebbe estis redaktoro de la revuo *Clarté* kaj devis fuĝi el Berlino en 1933 kaj poste al Svedio dum la nazia okupacio de Danlando. Paul mem kaj lia edzino Kamma Bodil estis konvinkitaj pacifistoj; tamen ili disdonadis flugfoliojn dum la okupacio kaj loĝigis kontraŭulojn en sia hejmo. (Persona informo de Jesper de Neergaard 2012-02-18, 2012-02-20.)

4. Profesia laboro

Li malkovris kaj kiel la unua sciencisto priskribis (1.2.1942) novan specion, cidroŝimo, kiu nun havas la sciencan nomon *Phialophora mustea* Neerg. 1942. La genro *Phialophora* havas proksimume 64 speciojn.

Li mallonge mencias pri tiu sia malkovro kaj priskribo en (1.2.1955a:93), verko bazita sur lia prelego ĉe ISU 1949 en Bournemouth.

Li doktoriĝis en Kopenhago en 1945. Lia disertaĵo havis la titolon *Danish Species of Alternaria and Stemphylium: Taxonomy, Parasitism, Economical Significance*.¹ La doktoriĝa laboro daŭris dek jarojn, de 1935 ĝis 1945, kaj ampleksis dudek mil eksperimentojn en vitraj testtuboj, kie li kreskigis sterilajn plantidojn infektitajn per malsanigaj organismoj. Lia edzino dum jaroj tajpadis kaj ree tajpadis liajn enormajn manuskriptojn. (Jesper de Neergaard, persona informo 2012-02-20, 2012-04-17.)

Dum la periodo 1935–1951 Paul Neergaard estis sempatologo ĉe la firmao J. E. Ohlsens Enke en Kopenhago. Li estis estro de la Registara plantprotekta servo 1952–1966, kaj profesoro pri plantpatologio kaj semteknologio ĉe la Usona Universitato en Bejruto, Lebano, 1959–1960. Ekde 1966 li estis direktoro de la jam menciita Danlanda registara instituto pri sempatologio por evolulandoj. Li pensiĝis de tiu posteno 1982-02-28. En la aŭtuno de tiu jaro internacia simpozio estis organizita honore al li (1982-10-11–16). En 1979 li estis gastprofesoro en la Universitato de

¹*Alternaria* kaj *Stemphylium* estas du genroj de fungoj de la ordo Pleosporales kaj la familio Pleosporaceae. Ili kaŭzas gravajn malsanojn ĉe plantoj.



Eksperimentoj pri infekto de sterilaj plantidoj sur kiuj baziĝis la doktora disertaĵo de Paul Neergaard.

TABLE 2 Seed Lots employed in Infection Experiments with Sterile Seedlings.

Seed lots main test plants are underlined	Disinfect. dose G = $\frac{1}{6}$ Germisan U = $\frac{1}{6}$ Uspulun H = Period of immersion in hours	Seedling infection experiment No. × = employed in the respective experiment																					
		1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22
Ageratum houstonianum perfectum 92 A	$\frac{1}{2}$ G, 4 H										×												
Antirrhinum majus nanum Defiance H. K./A.	$\frac{1}{4}$ G, 2 H																		×	×			
Artemisia scoparia gracilis 5523	$\frac{1}{4}$ G, 1 H																				×		
Bean Aladdin 463 B	$\frac{1}{2}$ G, 1 H																						
<u>Cabbage</u> Roem v. Enkhuizen 572 U II.	$\frac{1}{2}$ G, 3 H	×																					
” ” ” ” 349 V	$\frac{1}{2}$ G, 3 H			×	×	×	×		×	×		×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
Calendula officinalis Dania 791 B	$\frac{1}{4}$ G, 1 H																						
Capsicum annum 92 U	$\frac{1}{2}$ G, 1 H						×	×		×									×	×			
” globatum 92 V	$\frac{1}{2}$ G, 1 H						×	×		×									×	×	×		
<u>Carrot</u> Nantes improved 216 U	$\frac{1}{2}$ G, 1 H	×																					
” ” ” 226 U	$\frac{1}{2}$ G, 1 H		×																				
” ” ” 275 V	$\frac{1}{2}$ G, 3 H					×	×	×		×	×		×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
Celery Non plus ultra 211 R	$\frac{1}{4}$ G, 5 H	×	×		×																		
Cheiranthus cheiri Double Dwarf Branching 168 V	$\frac{1}{2}$ G, 6 H				×						×	×			×								×
<u>Cucumber</u> Vorgebirgs Trauben 818 S	$\frac{1}{2}$ G, $\frac{1}{6}$ H	×			×																		
” ” ” 975 T a	$\frac{1}{2}$ G, $\frac{1}{6}$ H				×	×	×		×	×		×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
<u>Dianthus</u> caryophyllus fl. pl. rosa 86 U II	$\frac{1}{2}$ G, 3 H	×																					
” Mohrenkönig 304 V	$\frac{1}{2}$ G, 3 H				×	×	×	×		×	×		×	×	×	×	×	×	×	×	×	×	×
Eggplant Black Beauty 146 V	$\frac{1}{2}$ G, 1 H						×	×		×									×	×	×		
Godetia hybrida Azaleiflora fl. pl. 359 V	$\frac{1}{2}$ U, $\frac{4}{3}$ H		×							×													
” Bijou 519 U	$\frac{1}{2}$ U, $\frac{4}{3}$ H			×						×				×							×		×
” Bijou × Kelvedon Glory 1941	$\frac{1}{2}$ U, $\frac{4}{3}$ H												×										
” Duke of York 1655 V	$\frac{1}{2}$ U, $\frac{4}{3}$ H				×					×													
” Gloriosa 602 V	$\frac{1}{2}$ U, $\frac{4}{3}$ H		×							×													

Tabelo montranta rezultojn de eksperimentoj pri infekto de sterilaj plantidoj.

Mysore, Karnataka, Barato. Tie li estis nomumita honora doktoro, *Doctor Honoris Causa*.

La oficiala nomo de la sempatologia instituto estis en la angla *Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries* (DGISP). Nuntempe ĝi havas la nomon *The Danish Seed Health Centre for Developing Countries* (DSHC) kaj estas parto de la Kopenhaga universitato. La adreso estas: Faculty of Life Sciences, University of Copenhagen, Thorvaldsensvej 40, DK-1871 Frederiksberg C. La nuna direktoro estas Ole Sjøgaard Lund.

5. Elstara esperantisto

Paul Neergaard estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto jam en 1934, nur 27-jara, kaj estis ties vicprezidanto dum multaj jaroj, ekde 1963 ĝis sia morto en 1987.

Li estis membro kaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

Li prelegis dekfoje en la universalaj kongresoj kaj kvarfoje estis rektoro de Internacia Somera Universitato (ISU; nun Internacia Kongresa Universitato, IKU).

Li estis membro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kaj fonda membro de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS).

Internacia Sciencia Akademio Comenius



Integro tutmonda

En 1986 li fondis kun Ivo Lapenna la Akademion Comenius, kies moto estas *Integro tutmonda*, kaj kies emblemo estas pruntita de la tenilo de vikingtempa glavo.



La doktora vespermanĝo 1945 okazis en la hejmo de Paul kaj Kamma Bodil. Ŝi sidas ĉe lia dekstra flanko. Ĉeestas iliaj tri ĝistiamaj infanoj. Maldekstre ĉe la tablo sidas lia filino Birgitte. La knabo sidanta apud Paul estas lia filo Jesper. La knabo sidanta dekstre pli proksima al la fotilo estas lia filo Jørgen. Krom la nova doktoro mem kaj lia edzino kaj iliaj infanoj ĉeestas dek laboratoriaj asistantoj kaj sekretarioj ĉe la firmao J. E. Ohlsens Enke.

6. La esperantologio kaj ties disciplinoj, 1942

En 1942 Paul Neergaard publikigis rimarkindan artikolon, “La esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj” (2.2.1942d). Ĝi aperis en libro kun la nomo *Tra densa mallumo* (2.3.1942) kaj montriĝis gvida kaj vojmontra. La densan mallumon kreis kompreneble la tiama nazia okupacio de Danlando.

La enhavo estas:

- I. Enkonduko
- II. La disciplinoj de la esperantologio. Konciza sinoptiko kun difinoj
- III. La materialo de la esperantologio
- IV. La rezultoj kaj la taskoj de la esperantologiaj fakoj
- V. Utiligo de la ĝisnunaj rezultoj por estontaj esploroj
- VI. Bibliografio

En la dua ĉapitro li unue sisteme prezentas la subdisciplinojn (pp. 38–39):

1. *Fonetiko*
2. *Leksikologio*
 - a. *Vortkunmeto*
 - b. *Morfologio*
 - c. *Vortenkonduko*
 - 1) *Ĝeneralaj vortoj*
 - 2) *Terminoj*
 - 3) *Propraj nomoj*
 - d. *Vortregistrado*
 - e. *Kvanta vortara analizo*
3. *Etimologio*
4. *Sintakso*
5. *Semantiko*
6. *Stilistiko*
7. *Analizo de l' evoluo filogeneza [kladogeneza]*
8. *Analizo de l' evoluo ontogeneza*
9. *Kompara esperantologio*
10. *Pedagogio*
11. *Bibliografio*

Al ĉiu rubriko li aldonas mallongan difinon de la menciita termino.

Per tio li pli-malpli priskribas la kampon de esperantologio, al kiu li dediĉos sian estontan revuon *Esperantologio*. Ni povas rimarkigi ke mankas en la listo sociolingvistiko.

Poste li prezentas en la tria ĉapitro “la materialon de la esperantologio” kaj, ofte tre detale, en la kvara ĉapitro, la rezultojn kaj taskojn de la esperantologio. El tiu kvara ĉapitro mi citas:

DREZEN (1935) faris gravan studon pri problemo de internaciigo de scienca-teknika terminaro; en ĝi li proponas Esp-on kiel bazon por kreado de internacia terminologia kodo. Flanke de ISA (Internacia Asocio de Normig-asocioj) la propono estis favore akceptata por plua pristudado. La efektivigo de tiu projekto, pri kiu oni serioze laboris ĝis la eksplodo de la nuna milito, signifus, ke Esp-o ekokupus la saman pozicion en la teknikaj sciencoj, kiel la latina lingvo nun okupas en la biologiaj sciencoj. (Neergaard 2.2.1942d:49)

La menciita verko de Ernest Drezen (1892–1937) estas

Drezen, E. (1935). *Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro. Historio, nuna stato kaj perspektivoj*. 84 pp. Moskvo; Amsterdamo. [La libro aperis unue en la rusa en 1934. La esperanta versio estis represita en 1983 kun postparolo de Alfred Warner, eldonita en Saarbrücken fare de Iltis; 93 pp.]

7. La revuo *Esperantologio*, 1949–1961

Paul Neergaard fondis gravan revuon pri esperantologio en 1949, kaj redaktis ĝin ekde tiam ĝis 1961. Multaj elstaraj esperantologoj publikigis siajn studojn en tiu revuo. Aperis ses kajeroj, ampleksantaj entute 424 paĝojn.

8. Popularsciencaj verkoj

Lia plej konata popularscienca verko esperantlingva estas *La vivo de la plantoj*, eldonita en 1957 de Juan Régulo Pérez (1914–1993) kaj kun ilustraĵoj de Mads Stage (1.1.1957a).

La lingvaĵo de la libro estas belega – kaj la enkonduko tre viva. Li imagas sin liliputano ĉirkaŭiranta en la kreskaĵo, komence tritika ŝalmo, kiu por li estas granda kiel *Rundetårn*, la konata ronda turo en Kopenhago konstruita en la deksepa jarcento kaj 41,8 metrojn alta – ne, fakte la tritika ŝalmo proporcie estas multe pli alta ol *Rundetårn*. Similan aliron al la temo li estis uzinta jam en sia ISU-prelego en 1949 en Bournemouth (1.2.1954b, 1.2.1955a). La desegnaĵoj de Mads Stage belege kompletigas la rakonton.

La libro aperis unue en la dana en 1956; la postan jaron en esperanto. El la dana estis tradukitaj eldonoj en la sveda kaj finna; el la esperantlingva libro estis tradukitaj eldonoj en la litova kaj pola. Aperis la libro ankaŭ en la serbo-kroata kaj en dana brajlo.

9. *Sciencaj studoj* eldonitaj de ISAE, 1958

La Internacia Scienca Asocio Esperantista estis fondita dum la dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo en 1906. Dum la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago en 1956 la asocio celebris sian kvindekjariĝon: Paul Neergaard tie prelegis, kaj lia prelego aperis kiel kontribuaĵo en granda libro, *Sciencaj studoj*, redaktita de li kaj publikigita en Kopenhago en 1958 (1.3.1958).

Tiu libro enhavas dek kvin kontribuaĵojn en la humanisma parto kaj dudek unu en la matematika-naturscienca parto. Ĝi estas unu el la plej ampleksaj sciencaj publikigaĵoj en esperanto, precipe kiam temas pri natursciencoj.

10. Granda libro pri sempatologio, 1977

La ĉefa profesia verko de Paul Neergaard estas la duvoluma *Seed Pathology* eldonita en 1977 (1.1.1977). Por doni ideon pri ties amplekso mi listigas la enhavon.

- Volume 1, 1977. xxiv + 839 pp.
Part I, Pathogens – Diseases – Hosts
Part II, Mechanisms of seed transmission
Part III, Principles of Control
Part IV, Seed health testing Methods
Part V, Assessment of seed-borne inoculum.

La dua volumo enhavas ĉefe terminlistojn kaj bibliografion:

- Volume II, 1977
Glossary, 841–877
References, 879–1020
Index, 1021–1187.

En la bibliografio estas menciita nur unu verko en esperanto: (1.2.1958) “La saprofito fungoflaŭro de kelkaj hortikulturaj semspecoj”, publikigita en la libro *Sciencaj Studoj*, jam menciita en sekcio 9.

Li dankas al Gaston Waringhien, kiu kontrolis la etimologion de la latindevenaj kaj grekdevenaj vortoj en la glosaro.

Esperanto ne estas menciita en la indekso.

11. Semoj kaj minacoj al ili

Alia grava popularscienca verko aperis en 1985, *Seed – A Horse of Hunger or a Source of Life?* (1.1.1985, 1.1.1986). Mi citas la enhavliston:

1. The Green Revolution – how green?
2. Seed as a Horse of Hunger
3. The Birth of Technology
4. Detection, the Key of Prevention
5. The Spread of Seed Pathology in the Third World
6. Language Barriers and Corrosion of Communication in Science.

Speciale atentindas la sesa ĉapitro: “Language Barriers and Corrosion of Communication in Science”, pp. 114–140. Tie li skribas i.a.: “I think, China is keeping a Dark Horse” (‘Mi pensas ke Ĉinio kaŝe tenas Nigran Ĉevalon’ p. 140). Kaj tiu ĉi Nigra Ĉevalo estas esperanto, kiun la ĉinoj konservas (kaŝe) kiel estontan mondlingvon.

Esperanto estas menciita en la indekso.

12. Aŭtoro de granda verkaro

Neergaard publikigis multajn verkojn. En la datenbazo `bibliotek.dk` ĉe *Dansk BiblioteksCenter* estas listigitaj 130 verkoj (2012-04-20) sub lia nomo, el kiuj la plejmulto temas pri plantoj kaj ties malsanoj kaj estas verkitaj en la angla aŭ la dana. En la parta bibliografio ĉi-malsupre estas listigitaj nur parto de tiuj laste menciitaj verkoj. Male, mi klopodas esti kiel eble plej kompleta rilate al liaj verkoj en esperanto.

13. Post la morto en 1987

Post lia morto Marjorie Boulton verkis laŭdan artikolon pri lia vivo kaj aktiveco, en tre persona tono.

Oni petis min plekti girlandon, por honori la memoron de Paul Neergaard, ĉefredaktoro de *Esperantologio* de [1949] ĝis 1961; kaj mi trovas la taskon tre malfacila, ĉar scioj kaj memoroj preskaŭ sufokas min, kvazaŭ en ĉambro plena de diversodoraj materialoj: necesas rozoj, lilioj, diantoj, lotusoj, narcisoj, gencianoj, erikoj, hibiskoj, asfodeloj, konvaloj, lekantoj, violoj, floroj el multaj landoj; kaj, ĉar tre interesis lin folkloraj nomoj de floroj, ankaŭ kristorozo, ĉevalpiedo, kavalirsprono, leonfaŭko, paŝtista burso, ora vergo, sunfloro kaj, kompreneble, neforgesumin' – kvankam la lasta estas admono superflua. Kaj ĉar li faris unikan, vastan laboron por plibonigi grenrikoltojn tra la mondo kaj tiel batali kontraŭ malsato, devus enesti kelkaj spikoj de tritiko kaj hordeo, panikloj de aveno, rizo, milio, sorgo, eĉ spadiko de maizo. (Boulton 3.1999a:7)

Ŝi finas per la vortoj

[...] kiam Paul Neergaard mortis, estingiĝis vere granda, grava fonto de intelekta lumo kaj kora varmo. (Boulton 3.1999a:13)

Dankesprimio

Mi dankas al Jesper de Neergaard, filo de Paul, kaj Birthe Lapenna por valoregaj personaj informoj kaj por disponigo de bildoj kaj dokumentoj.

14. Parta bibliografio de Paul Neergaard

1. Fakaj verkoj pri sempatologio kaj aliaj temoj

1.1. Ĉefaj monografioj

- 1.1.1937. *Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso. Populara skizo.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 60 pp. [Vidu sekcion 3.]
- 1.1.1945. *Danish Species of Alternaria and Stemphylium: Taxonomy, Parasitism, Economical Significance.* Kopenhago: Einar Munksgaard; Londono: Humphrey Milford, Oxford University Press. 560 pp. (Lia doktora disertaĵo. Kun resumo en esperanto.)
- 1.1.1954. *Atakoj kontraŭ la ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin.* Rickmansworth (Hertfordshire), Anglujo. 234 pp. + 9 falddtabuloj.
- 1.1.1956. *Grøn er vor jord [Verda estas nia tero].* Ilustraĵoj de Mads Stage. Det Danske Forlag. 119 pp. [Vidu sekcion 8.]
- 1.1.1957a. *La vivo de la plantoj.* Ilustraĵoj de Mads Stage. La Laguna: Stafeto. 128 pp. [Vidu sekcion 8.]
- 1.1.1957b. *Vår gröna jord [Nia verda tero].* Ilustraĵoj de Mads Stage. Traduko de (1.1.1956) en la svedan. Stokholmo: Kooperativa förbundets bokförlag. 118 pp. [Vidu sekcion 8.]
- 1.1.1958. *Vihreä on maailmamme.* Traduko de (1.1.1956) en la finnan fare de V. Vankkoja; ilustraĵoj fare de Mads Stage. Helsinko: Kirjapaino. 118 pp. [Vidu sekcion 8.]
- 1.1.1960. *Augalų gyvenimas [La vivo de la plantoj].* Traduko de (1.1.1957a) en la litovan fare de Jonas Dagys; ilustrita de Mads Stage. Vilnius. 121 pp. [Vidu sekcion 8.]

- 1.1.1962. *Zycie roslin* [La vivo de la plantoj]. Traduko de (1.1.1957a) en la polan fare de Anna Dratwerowa kaj Isaj Dratwer. Ilustraĵoj fare de Mads Stage. Varsovio: Powszechna. 120 pp. [Vidu sekcion 8.]
- 1.1.1977. *Seed pathology*. Londono; Basingstoke: The MacMillan Press Ltd. Du volumoj. 1187 pp. [Vidu sekcion 10.]
- 1.1.1985. *Seed – A Horse of Hunger or a Source of Life?* Published by the Director, Prasaranga, University of Mysore, Mysore, Karnataka, Barato. vi + 176 pp. [Vidu sekcion 11.]
- 1.1.1986. *Seed – A Horse of Hunger or a Source of Life?* Reviziita eldono de (1.1.1985) kun postskribo. vi + 174 pp. Kopenhago: Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries. Presita en Mysore. [Vidu sekcion 11.]

1.2. Studoj kaj eseoj en antologioj kaj revuoj

- 1.2.1942. *Phialophora mustea*. *Zentralblatt für Bakteriologie, Parasitenkunde und Infektionskrankheiten, Zweite Abteilung* **104**(23-24), 408. [Vidu sekcion 4.]
- 1.2.1943. Elementa mikologia terminaro esperanto-latina-dana-germana kun difinoj en Esperanto. *Dansk Esperanto Tidende* 4-a jaro, n-ro 1–2, pp. 2–5; n-ro 3–4, pp. 29–34.
- 1.2.1948. Standardisering indenfor havebrug og gartneri [Normigado ene de ĝardenistiko kaj hortikulturo]. *Nordisk Illustrert Havebrugsslexikon*. Kvara eldono, volumo 3, pp. 449–452.
- 1.2.1949. El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj. **En:** *Somera Universitato, Malmö*, p. 58–72. Rickmansworth (Hertfordshire), Anglujo.
- 1.2.1954a. Virusmalsanoj en fruktoarboj. *Scienca Revuo* **5**, 3, 106–110.
- 1.2.1954b. Ŝimfungoj en la hejmo: Liliputano rigardas ŝimfungetojn en la lando de la gigantoj. Internacia Somera Universitato, Bournemouth. *Scienca Revuo* **6**, 2, 57–66. [Vidu sekcion 8.]
- 1.2.1955a. Ŝimfungoj en la hejmo: Liliputano rigardas ŝimfungetojn en la lando de la gigantoj. **En:** Ivo Lapenna, red., *Internacia Somera Universitato: Elektitaj prelegoj*, pp. 87–96. Purmerend: Muusses. Volumo 2, 1949–1954. [Vidu sekcion 8.]
- 1.2.1955b. Kiel la sciencistoj donas nomojn al la plantoj? *Sennacieca Revuo* **83**, 45–48.
- 1.2.1958. La saprofitaj fungoflaŭro de kelkaj hortokulturaj semspecoj. Kun resumo en la angla. **En:** (1.3.1958:201–208).
- 1.2.1959. Interŝtata kunlaboro pri plantprotektado. Internacia Somera Universitato, Haarlem 1954. *Scienca Revuo* **10**, 2/3, 85–95.
- 1.2.1963. Ekas vivo – naskiĝas printempe plantidoj. *Sennacieca Revuo* **91**, 44–47.
- 1.2.1965. La lukto kontraŭ malsato. *Esperanto* 58, p. 206–209.
- 1.2.1968. La giganto inter la evolulandoj. Impresoj el vizito en Hindio. *Sennacieca Revuo* **96**, 20–26.
- 1.2.1969. Frøpatologisk institut for utviklingslandene [Sempatologia instituto por la evolulandoj]. *Ugeskrift for agronomer*, **23**, 456–462.
- 1.2.1970. Suggestions regarding the international standardization of translatable names of cultivars. *La Monda Lingvo-Problemo*, 2:5, 65–76. Resumo: Sugestoj pri la internacia normigo de tradukeblaj nomoj de kultivaroj. Propono pri lingva normigo de tiu nomenklaturado per adopto de Esperanto.
- 1.2.1979. Navngivning af plantesygdomme på dansk [Nomado de plantmalsanoj en la dana]. *Tidsskrift for planteavl*. Volumo **83**, kajero 3, 254–276.
- 1.2.1982a. Universala formlingvo de moderna skulptado. *Monato* 3:2, p. 20.
- 1.2.1982b. Lernprocezo kaj instruefiko en la kazo de la ekkono de malsanoj ĉe plantsemoj. **En:** Frank, Helmar G., red., International Congress on Cybernetics (1980, Namur), *Lingvokibernetiko kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. Sprachkybernetik und andere internationalsprachige Akten vom IX. Internationalen Kybernetikkongress*, 166–169. Tübingen: Narr. 190 pp.

- 1.2.1986. Screening for plant health. *Ann. Rev. Phytopathol.* **24**, 1–16.
- 1.2.1991. Flugantaj semoj. **En:** Auld, William, red., *Nova Esperanta Krestomatio*, pp. 237–240. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- 1.2.1992. Neergaard, Paul; Frank, Helmar; Hengst, Martin. Studoj pri mezurado kaj modeligo de la ĝeneraliga lernoprocezo por la fakdidaktiko de la sempatologio, partoj A–E. **En:** (2.3.1992:79–108). La parton B (2.3.1992:81–84) verkis Neergaard: Lernoprocezo kaj instruefiko en la kazo de la ekkono de malsanoj ĉe plantsemoj.

1.3. Redaktaĵoj

- 1.3.1936–1951. 1–15. Årberetning fra J. E. Ohlsens Enkes plantpatologiske laboratorium 1935–1950 kun esperantoresumoj en ĉiuj raportoj kaj kun terminologiaj listoj de plantpatologiaj kaj mikologiaj vortradikoj en la 10-a kaj 15-a raportoj. Kopenhago. 280 pp.
- 1.3.1958. *Sciencaj studoj bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj. Eldonita okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista.* Vinjetoj de Mads Stage. Kopenhago: Internacia Scienca Asocio Esperantista. 241 pp.

1.4. Aliaj fakaj aktivaĵoj

- 1.4.1936a. Några sjukdomar på växthusplantor och deras bekämpande: Föredrag hållet vid Nordvästra Skånes Gartnersällskaps sammanträde den 17 mars 1936 [Kelkaj malsanoj ĉe forcejaj plantoj kaj la lukto kontraŭ ili: Prelego ĉe la kunsido de la Hortikultura Societo de Nordokcidenta Skanio [Svedio] la 17-an de marto 1936].
- 1.4.1936b. Kulturförhållanden inflytande på utvecklingen av trädgårdsväxternas smittosamma sjukdomar: Föredrag inför Södertälje trädgårdssällskap onsdagen den 9 december 1936 [Kultura influo sur la evoluo de la kontaĝaj malsanoj de la ĝardenaj plantoj: Prelego antaŭ la Ĝardena Societo de Södertälje [Svedio] merkredo la 9-an de decembro 1936]. Arlöv.
- 1.4.1937a. Om bekämpning av sjukdomar på krukkulturer: Föredrag vid Västra Sveriges trädgårdsmannasällskaps sammanträde i Göteborg den 7 mars 1937 [Pri la lukto kontraŭ malsanoj de pote kultivataj plantoj: Prelego ĉe la kunsido de la Ĝardena Societo de Okcidenta Svedio en Gotenburgo la 7-an de marto 1937]. Arlöv.
- 1.4.1937b. *Sellerisjukdomar och deras bekämpande* [Malsanoj ĉe celerio kaj la lukto kontraŭ ili]. Arlöv.
- 1.4.1948. *Praktiske erfaringer med Hexasect i 1946 og 1947* [Praktikaj spertoj pri Hexaset en 1946 kaj 1947]. Kopenhago: J. E. Ohlsens Enkes Plantepatologiske Laboratorium. 7 pp.
- 1.4.1983. My readers and friends. (Noto pri Suresh Behari Mathur, lia posteulo kiel direktoro de la instituto.) *Seed Pathology News*, n-ro 15, p. 4. Kopenhago: Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries.

2. Esperanto kaj esperantologio

2.1. Monografioj

- 2.1.1933. *Fremdvortoj en Esperanto. La 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko en teorio kaj praktiko.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 64 pp.
- 2.1.1938. *Terminaro hortikultura seslingva* (esperanta — dana — sveda — germana — angla — franca) kun difinoj en esperanto. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 29 pp.
- 2.1.1939. *Esperanto for begyndere* [Esperanto por komencantoj]. Kopenhago: Forlaget Fremad. 83 pp.
- 2.1.1944. Neergaard, Paul; Thorsen, P. *Eta krestomatio.* Rudkøbing: Esperanto-Forlaget, SEFO. 48 pp.
- 2.1.1946. *Fitopatologia kaj mikologia terminaro.* Kopenhago: J. E. Ohlsens Enke.
- 2.1.2001. *Fremdvortoj en esperanto.* [Rete legebla versio de 2.1.1933.] Tyresö: Inko. 53 pp.

2.2. Studoj kaj eseoj en antologioj kaj revuoj

- 2.2.1933. Difinado de la vortoj *abio* kaj *piceo*. *Sennacieca Revuo* (nova serio) **1**, 9, 130–132.
- 2.2.1934. La universala karaktero de Esperanto. *Sennacieca Revuo* (nova serio) **1**, 179–180.
- 2.2.1942a. Esprimo de miro kaj malŝato per blasfemaĵoj kaj vulgaraĵoj en Esperanto. *tamen* 1:4 (okt), p. 1–4. (“la sopra k logika stilo [de esperanto] ne konformas al la bezonoj por esprimi la fekundajn, sukplenaĵojn de la nacilingvoj – jen granda kampo kulturenda.” Ekzemplo: traduko de *Brava soldato Ŝvejk.*)
- 2.2.1942b. La Universala Karaktero de Esperanto. *tamen* 1:1 (maj – jun), pp. 3–6. Represo el *Sennacieca Revuo* de 1934-02-10. [Maldetala klasifo de la lingvoj en tri grupoj: amorfaj, aglutinaj, fleksiaj lingvoj. Esperanto tipe aglutina lingvo, tamen laŭ la deveno de la vortoj hindeŭropa (itala branĉo). Kp. (2.2.1934).]
- 2.2.1942c. Netransitivaj verboj sekvigantaj akuzativon. *tamen* 1:3 (sept), 9–11. Represo el *La Lernanto* 1934:9:11.
- 2.2.1942d. La Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. **En:** (2.3.1942:37–64). [Vidu sekcion 6.]
- 2.2.1943. Ĉu Esoeranto [tiel] estas plibonigebla? *tamen* 1:9 (mar), pp. 7–9. [Prelego kun diskuto pp. 9–10, dum kiu Poul Moth pledas por forigo de la akuzativo.]
- 2.2.1944. Esprimo de miro kaj malŝato per blasfemaĵoj kaj vulgaraĵoj en Esperanto. *Dansk Esperanto-Tidende*, 5-a jaro, n-ro 11–12, pp. 140–141. [Kp. (2.2.1942a).]
- 2.2.1947. Internacia lingvonormigo kaj esperanto. *Sennaciulo* **18**, n-ro 12, p. 7.
- 2.2.1950. Recenzo de la libro *Interlingvistiko kaj esperantologio*, verkita de W. Manders. *Esperantologio* **I**, n-ro 2, 137–141.
- 2.2.1951. Neatentitaj Zamenhofaj tekstoj. *Esperantologio* **I**, n-ro 3, 206–208.
- 2.2.1955a. Recenzo de la libro *Interlingua-English, a dictionary of the international language prepared by the research staff of the International Auxiliary Language Association under the direction of Alexander Gode*. *Esperantologio* **I**, n-ro 4, 245–247.
- 2.2.1955b. Recenzo de la libro *Naŭlingva etimologia leksikono*, verkita de Louis Bastien. *Esperantologio* **I**, n-ro 4, 247–248.
- 2.2.1955c. Recenzo de la libro *Plena vortaro de Esperanto. Suplemento*, redaktita de G. Waringhien. *Esperantologio* **I**, n-ro 2, 248–250.
- 2.2.1955. Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj. Studo kun speciala konsidero al biontologio. *Scienca Revuo* **7**, 2, 43–58.
- 2.2.1958. Retrospektiva rigardo al 50 jaroj da apliko de Esperanto en la scienco. **En:** (1.3.1958:9–19). Kun resumo en la angla.
- 2.2.1959a. Tradukado Nacilingven. *Esperanto* 52:3 (640), 49, 54.
- 2.2.1959b. La signifo de popularscienca literaturo kiel kompletiga legaĵo en la instruprogramoj de lernejoj. **En:** P. Zlatnar, red., *Esperanto kaj lernejo*, pp. 159–169. Ljubljano: Jugoslavia Esperanto-Asocio.
- 2.2.1960. Vivanta ligo de nacioj. *Esperanto*, n. 4, 63.
- 2.2.1961a. Gaston Waringhien 1901 – 29-an de julio – 1961. *Esperantologio* **II**, n-ro 2, 75–79.
- 2.2.1961b. Demokrateco ĉe vortelektio kaj vortderivado en lingvo internacia. *Esperantologio* **II**, n-ro 2, 127–135.
- 2.2.1962. La Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj en Kopenhago. *Scienca Revuo* **12**, 3/4, 133–134.
- 2.2.1963a. Al Margrethe Noll okaze de ŝia 80-jara naskiĝofesto en 1954. *Dansk Esperanto-Blad* 35:1, 4–6.
- 2.2.1963b. Margrethe Noll 22.5.1874 – 30.12.1962. *Dansk Esperanto-Blad* 35:1, p. 4.

- 2.2.1963c. La lingva problemo en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. Internacia Somera Universitato, Kopenhago 1962. *Scienca Revuo* **13**, 1–4 kaj 103–110.
- 2.2.1963d. Kreado de Esperanto-instruistaro – la ŝlosilproblemo de Esperanto-instruado. *Internacia konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata*, pp. 29–42. Beogrado.
- 2.2.1965. Klasika Esperanto. *Heroldo de Esperanto*, **41**, n-ro 14 (1404), p. 2, p. 4. (Pri la traduko de la fabeloj de Andersen fare de Zamenhof.)
- 2.2.1966. Internacia lingvonormigo. Recenzo pri la libro *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik*, dua plivastigita eldono, 494 pp. Bonno: Bouvier. *Heroldo de Esperanto* **42**, n-ro 16 (1425), p. 1.
- 2.2.1967a. Plena Ilustrita Vortaro – necesa Esperanto-enciklopedio. *Heroldo de Esperanto* **15**, p. 1, p. 4. El la inaŭgura parolado ĉe Internacia Somera Universitato en Roterdamo 1967.
- 2.2.1967b. Internacia Esperanta Universitato 1967: Inaŭgura parolado. *Scienca Revuo* **18**, 4, 113–114.
- 2.2.1970. Serioza gvidilo. [Pri R. Haupenthal, Enkonduko en la librosciencan de Esperanto.] *Kontakto* **2**, p. 18.
- 2.2.1974. La lingva angulo. “Ĉu vi ne ŝatas viandon?": kiel ĝuste respondi al nea demando. *eho* **5**, 63.
- 2.2.1976a. Urĝaj taskoj de la scienco en la proksima estonteco. *Sennacieca Revuo* **104**, pp. 36–43.
- 2.2.1976b. Lingvaj problemoj kaj lingvo-politiko en evolulandoj. *Esperanto*, **69**, n-ro 1 (841), 6–11.
- 2.2.1979. *La esperantologio kaj ties disciplinoj: taskoj kaj rezultoj*. Represo de (2.2.1942d). Saarbrücken: Iltis. 28 pp.
- 2.2.1981. Rimarkoj pri EMT (Esperanta Medicina Terminaro) de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio). *Medicina Internacia Revuo* sept., **9**:3, pp. 143–144.
- 2.2.1986. Altnivela internacia scienc-akademio fondita. *Esperanto* **79**:5 (965), 82–83.
- 2.2.1987a. Letero de la Vicprezidanto de la Akademio al la Prezidanto de UEA. *Horizonto* **1987**:64, p. 83. [Subtenas la opinion de Lapenna por EK = Komunaĵo kontraŭ Komunumo kaj UN = Nacioj kontraŭ Naciaro.]
- 2.2.1987b. Plantnomoj en la Lingvo Internacia. *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo*, volumo II, Esperantismo, pp. 485–502. La Laguna: Universidad de La Laguna.
- 2.2.1987c. Recenzo de la libro de Ivo Lapenna, *Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al Esperantlingva jura terminologio*. *Horizonto* **1987**:70, pp. 88–89.
- 2.2.1988. Cent jaroj de Esperanto en la servo de natursciencoj kaj teknologioj. **En:** Fettes, Mark, red., *jubileo: jarcento de esperanto*, pp. 129–134. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- 2.2.1989. Cent jaroj de Esperanto en la servo de natursciencoj kaj teknologioj. **En:** Perko, Klaus, red., *Memorlibro pri la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo en Graz 1987*, pp. 112–119. Rødovre: Perspektivo. 168 pp.
- 2.2.1999. La sencovasteco de kelkaj vortoj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Eseo por instigi al diskutado. *Esperantologio / Esperanto Studies* **1**, 16–20.
- 2.2.2002. Frank, Helmar; Boulanger, Georges R.; Kindler, Hansjörg; DeSmet, Wim; Neergaard, Paul; O’Cara, Eoin; Pennacchietti, Fabrizio. Das Kommunikationsproblem als Nerv des europäischen Einigungswerks begreifen. **En:** Siegfried Piotrowski, red., *Europas Sprachlosigkeit: vom blinden Fleck der “European Studies” und seiner eurologischen Behebung* [La senlingveco de Eŭropo – pri la blinda makulo de la “European Studies” kaj ĝia eŭrologia korekto], p. 97. Munkeno: KoPäd Verlag. 284 pp.

2.3. Redaktaĵoj

- 2.3.1942. Neergaard; Thorsen; Iversen; Lau; Olsson. *Tra densa mallumo. Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo. Okaze de la 10-jara datreveno de laborista esperanta klubo Kopenhago 27. Aug. 1942*. Redaktita de komitato. Kopenhago: Laborista Esperanto Klubo. 64 pp.

- 2.3.1949a. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. I, n-ro 1, aŭgusto, 1–80.
- 2.3.1949b. Bibliografio de esperantologia literaturo 1940–1948, I. *Esperantologio I*, n-ro 1, 73–76.
- 2.3.1949c. Notoj: Universitataj katedroj de Esperanto. *Esperantologio I*, n-ro 1, 77–80.
- 2.3.1950a. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. I, n-ro 2, junio, 81–144.
- 2.3.1950b. Bibliografio de esperantologia literaturo 1940–1948, II. *Esperantologio I*, n-ro 2, 133–136.
- 2.3.1950c. Notoj: Universitataj katedroj de Esperanto II. *Esperantologio I*, n-ro 2, 142–143.
- 2.3.1951. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. I, n-ro 3, marto, 145–208.
- 2.3.1955a. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. I, n-ro 4, julio, 209–256.
- 2.3.1955b. Bibliografio de esperantologia literaturo 1940–1948, III. *Esperantologio I*, n-ro 4, 228–234.
- 2.3.1959. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. II, n-ro 1, novembro, 1–72.
- 2.3.1961. *Esperantologio. Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto*. Vol. II, n-ro 2, julio, 73–168.
- 2.3.1992. Neergaard, Paul; Kiselman, Christer. *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo. XI + 118 pp.

2.4. Aliaj publikigaĵoj

- 2.4.1950a. Enkonduko. *Esperantologio I*, n-ro 1, 1–2.
- 2.4.1950b. Introduction. *Esperantologio I*, n-ro 1, 3–4.
- 2.4.1958. Redakcia noto. **En:** (1.3.1958:6).
- 2.4.1986. Membro de la honora patrona komitato de UEA pri la UK de UEA en Varsovio. Letero 1986-02-08 al la prezidanto de UEA, G. Maertens. *Horizonto* 1986:63, p. 50.
- 2.4.1970a. (Kunaŭtoro de:) *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* pri botaniko, agrikulturo, hortikulturo, fitopatologio. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- 2.4.1970b. Enkonduko al la botanika kaj terkultura parto en *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, pp. xxii–xxiv. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- 2.4.1973. Komputila bibliografio. [Pri P. De Smedt, Nederlanda bibliografio. Dendermonde 1972]. *Esperanto* n-ro 4, p. 72.
- 2.4.1987. 100 jaroj de Esperanto en la servo de naturaj sciencoj. Sonkasedo, Graz 1987.
- 2.4.2001. Régulo-Pérez, Juan; Neergaard, Paul: Deklaro omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna. **En:** Minnaja, Carlo, red., *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, pp. 310–315. Kopenhago: Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. 417 pp.

2.5. Aliaj dokumentoj

- 2.5.1947. *Propono pri starigo de Bibliografia Sekcio de Esperantista Lingva Akademio*. Kopenhago, 3 folioj.
- 2.5.1953a. *Rapport vedrørende anvendelsen af Esperanto i Danmark*. Kopenhago: Danske Esperanto-Organisationers Fællesraad. 14 pp.
- 2.5.1953b. Raporto pri la aplikado de Esperanto en Danujo. Traduko de (2.5.1953a) el la dana lingvo fare de Gustav Kühlmann kaj Anna Riis. Kopenhago, 7 folioj.

- 2.5.1961. Retrospect on the scientific application of Esperanto. (Traduko el esperanto en la anglan fare de Victor Sadler.) Londono: Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado, 1961, 5 folioj.
- 2.5.1977. *Esperanto-biblioteko de Paul Neergaard: klasifiko kaj temaro (Universala Decimala Klasifikado)*. Kopenhago, 14 folioj. [Li havis 60 metrojn da libroj en sia kampara domo Stendal en Brændholt, Ugerløse. Li heredigis la kolekton al la Reĝa Biblioteko de Danlando, kie ĝi estas, almenaŭ principe, konsultebla fare de esploristoj.]

3. Pri Paul Neergaard

- 3.1962. P. Babin. Kelkaj minutoj kun doktoro P. Neergaard. Intervjuo. *Kulturaj kajeroj*, n-ro 2, 5–6.
- 3.1983. Suresh Behari Mathur. International Symposium honours Paul Neergaard. *Seed Pathology News*, n-ro 15, 1–4. Kopenhago: Danish Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries.
- 3.1987a. Lapenna, Ivo. Paul Neergaard 80-jara. *Horizonto* 1987:67, pp. 10–11.
- 3.1987b. (Anonime). Paul Neergaard (1907–1987). *Esperanto*, decembro, n-ro 984, p. 215.
- 3.1999a. Boulton, Marjorie. Paul Neergaard, 1907–1987. *Esperantologio / Esperanto Studies* **1**, 7–13.
- 3.1999b. Støp-Bowitz, Carl. Paul Neergaard kaj la problemo de la scienca lingvaĵo. *Esperantologio / Esperanto Studies* **1**, 14–15.
- 3.2001. Kiselman, Christer. La fondo de Akademio Comenius. **En:** Minnaja, Carlo, red., *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, pp. 101–104. Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Kopenhago: www.kehlet.com.

Adreso de la aŭtoro: Uppsala universitato, Matematika instituto
Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio

Komputilretaj adresoj: kiselman@math.uu.se, christer@kiselman.eu